
# REVUE SPIRITE

Journal d`Études Psychologiques
Fondée par ALLAN KARDEC

ISK
INTERNACIA SPIRITISMA KONSILIO



# Plureco de Akcioj

## Paŝo sur la vojo de progreso

Selektitaj Artikoloj

Jaro 167 | N- 15 | 2024

Ĉi tiu volumo enhavas kelkajn artikolojn el la Revuo Spirite de la jaro 167, Aprilo 2024 numero 15. Ĉi tio ne estas kompleta versio. Tradukoj estas respondeco de la tradukinto.
.

**TRADUKISTOJ KAJ REVIZIISTOJ EN ĈI TIU NUMERO**

GIVANILDO RAMOS COSTA
JOSÉ ROBERTO ALVES DE ALBUQUERQUE
SAULO SALGADO WANDERLEY
JOSÉ ROBERTO ALVES DE ALBUQUERQUE
LEANDRO DE SOUZA
MARIA APARECIDA TUON
PAULO PIRES



**Revue Spirite**
**Journal d`Études Psychologiques**
**Fondée par ALLAN KARDEC le 1er janvier 1858**

Havaĵo de la Internacia Spiritisma Konsilio (CEI)
Logo et Marque Européenne enregistrée à l'EUIPO (Office de l'Union Européenne pour laproprieté intellectuelle)
® Komerca marko 018291313
Mark française déposée à l'INPI (Institut National de la Propriété Intellectuelle) sur le numéro
® 093686835.

LA REVUE SPIRITE

**Redaktita de**
Federação Espírita Portuguesa
Praceta do Casal Cascais 4, r/c, Alto da Damaia, Lisboa
ISSN 2184-8068
Depósito Legal 403263/15
© copyright 2024
Jaro 167
Nº15
CSI | Kvaronjara | Aprilo 2024
Senpaga distribuo

**Direkto (ISK)**
Jussara Korngold

**Kunordigo (FEP)**
Vitor Mora Féria

**Redakcia kunordigo**
Sílvia Almeida

**Skribo kaj provlegado**
Cláudia Lucas
José Carlos Almeida

**Web**

Marcial Barros
Nuno Sequeira
Sandra Sequeira

**Arto & Dezajno**
Sara Barros

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com
www.cei-spiritistcouncil.com

# Indice


| | |
|---|---|
| JUSSARA KORNGOLD | ĈEFARTIKOLO |
| ARTUR VALADARES | SPIRITISMO KAJ FILOZOFIO |
| | LA PLURECO DE LA EKZISTADOJ KAJ LA LOGIKO EN KARDEC |
| ALUIZIO ELIAS | SPIRITISMO KAJ RELIGIO |
| | KARMAJ EMBARASOJ KAJ MALUTILAJ RIĈAĴOJ |
| SPIRITO HONÓRIO ABREU | REDUTO DE MALLUMO |
| BRUNO LINS QUINTANILHA | SPIRITISMO KAJ SOCIO |
| | LA SPIRITISMA DOMO: GRAVECO, EBLECOJ KAJ NOTOJ |
| ELDONEJO SPIRITISMA MOMENTO | SPIRITISMA MOMENTO |
| | DIO, KIE VI ESTAS? |
| INTERVJUO | INTERVJUO JACOBSON TROVÃO |

## ĈEFARTIKOLO



**JUSSARA KORNGOLD**

**TRADUKISTO:** Saulo Salgado Wanderley

Rifletante pri la pluralo de ekzistoj ne eblas ne esti intrigataj. Multaj demandoj venas al nia menso. Kiom da vivoj ni jam vivis? Kiuj lokoj jam gastigis nin kiel patrio? Kio ni estis? Ĉu niaj nomoj troviĝas en la historio? Sed ni devus konsideri ke, pli grava ol lokoj, lingvoj, landoj kaj pozicioj, estas tiuj, kiuj faras tiun vojaĝon kun ni. Ofte ili venas kiel ĉefaj personoj de la proksima familio kaj aliaj fojoj malpli. Kun ĉiu nova sperto, novaj grupoj de spiritoj estas aldonitaj, kaj tiel nia rondo de afektaj rilatoj pli grandiĝas.

Laŭ la Spirito Emmanuel, "ni ricevas en la hejmo la heredaĵon de la pasinteco, kun kiu ni restrukturos nian propran destinon, en la direkto de la estonteco. Ĝuste tie, en la fervora krucibo de intensaj spiraj reagoj, la koro ekzerciĝas por servi al la pli granda familio, kiu etendas sin en la homaro."[1]

La Spirito Joanna de Ângelis diras al ni ke "la familio estas la fundamenta bazo sur kiu staras la vasta konstruaĵo de la socio. En la malgranda doma grupo komenciĝas la sperto de la universala fratineco, provante la paŝojn por noblaj agadoj favore al la konstruo de la ekvilibrigita socio."[2]

Familio estas nia laboratorio por veki la plej noblajn sentojn kaj profundajn rilatojn, travive ekprenante amon, toleremon, paciencon, pardonon, kaj kompatemon, por fine atingi fratan amon, kiam ni vidos nin kiel fratoj kaj fratinoj en nia evolua vojaĝo.

Tial ni ne malestimu la familion kaj la plej proksimajn rilatojn ĉirkaŭ ni, ĉar ili estas niaj grandaj instruistoj pri virtoj kiujn ni devas akiri, kaj ili nin kondukos al unueco kun la Patro.

---

1 XAVIER, Francisco C. (Diversaj Spiritoj). Mankumitaj Manoj, Ĉapitro 21. Araras: IDE.

2 FRANCO, Divaldo P. (Joanna de Ângelis, Spirito). Familia Konstelacio, Antaŭparolo. Salvador: LEAL.

## N15 TEKTO TEAM

### TEKSTO DE LA TEAMO 15

Ĉiun novan ekziston, la Spirito faras paŝon sur la vojo de progreso. - (KARDEC, Allan, La Libro de la Spiritoj, k. 168)

Jam en 1785, la franca kemiaĵisto Antoine Laurent de Lavoisier (1743-1794) asertis, ke en Naturo ĉio transformiĝas, kvankam nenio pereas aŭ kreas. Translokante la leĝon de konservado de maso de Lavoisier en la domajno de la Spirito, ni konstatas, ke ĝi havas ankaŭ ĉi tie sian kongruan "legecon". Kiel kunkreanto en pli granda aŭ malpli granda skalo, en la materiala sfero la Spirito konceptas el tio, kio jam estis antaŭe kreita de Dio, modelante la Kosman Universalan Fluaĵon, kiel l'artoisto modelas la argilon, ne inventas la argilon, nek eliminas ĝin. Ĉion li povas krei, escepte la materian bazon, per kiu li kreas! En la spiritisma sfero, li estas la artofaranto de sia senmorteco, evoluigante kapablojn, forĝante lernadojn kaj sublimigante travivaĵojn, sed li ne kreas sian propran Spiriton nek sian potencialon, nur evoluigas kaj transformas tion, kio jam ekzistis en ĝermo!

Se tempo estas la komuna vojo de piedirado, la multoblaj materialaj ekzistoj estas la procezo, tra kiu la renoviĝoj kaj transformiĝoj okazas, "ĉar la progreso estas preskaŭ senfina". Por ĉiu nova ekzisto, nova paŝo sur lia vojo!

### TEKSTO DE KAPA 15

Naskiĝi, morti, denove renaski estas la neevitebla, restas al ni la progreso.
Unu simpla paŝo ofte estas neimaginebla venko, kiu transportas la animon al la liberiga flugo de la estonteco.
La Naturla Leĝo estas perfekta matematika ekvacio, ebliganta la pluralon de reeniroj.
En tiu ĉi ekvacio, unu el la ĉefaj faktoroj estas la espero, kiu propelas la eston en lia transformiĝo.
Per reeniro, la Leĝo invitas nin al ŝanĝo: de korpo, de familio, de kutimoj, de loko; ĝi defias nin al sperto de komforto kaj malfacileco - eduka procezo, kiu antaŭenigas niajn elektojn.
La koncepto de impulso, kiu movas ĉiun paŝon, ilustras nian elekton de kovrilo por ĉi tiu nombro de la *Revuo.*
La impulso, kiu levigas la estontecon.

### Emfazita frazo

"Progresante en nia interna maturiĝo, ni rekonas, ke evoluo estas vojo formiĝanta al Supro, referante nin al spirita progreso."

XAVIER, Francisco C. (Emmanuel, Spirito). "Algo mais". Urbo: Ideal.

# SPIRITISMO KAJ FILOZOFIO
# LA PLURECO DE LA EKZISTADOJ KAJ LA LOGIKO EN KARDEC


Artur Valadares

**ARTUR VALADARES**

**BIO:** Artur Valadares, inĝiniero kaj analisto de datumoj, Spiritisma Eksponanto kaj unu el la fundantoj kaj kunordiganto de NEPE Paŭlo el Tarso, en São Carlos/SP - Brazilo

**TRADUKISTO:** Leandro de Souza

**RESUMO:** Ekde esploro de Kardec pri la plureco de la ekizistadoj aŭ reenkarniĝo,oni faras analizon ĉirkaŭ logika rezonada método, tre uzata de la Kodiganto dum la strukturado de la Doktrino de la Spiritoj, reliefigante ĝian gravecon por la komprenado de la Kardeca Metodo de la proceso mem de analizado kaj konstruado de la spiritisma konado.

**ŜLOSILVORTOJ:** plureco de la ekzistadoj, reenkarniĝo, logiko, justeco, atributoj de Dio.

En interessa artikolo en la *Spirisma Revuo*, novembro, 1858, sub la titolo "Plureco de la korpaj ekzistadoj", Kardec teksas tre rilatajn konsiderajojn pri la reenkarniĝo, tiam konsiderata doktrino ankoraŭ polemika en la kunteksto de la naskiĝinta Spiritismo.

Elmontrante grandan intelektan honestecon, karaktero de tiuj kiuj sincere serĉas la veron, la Kodiganto mencias ke la koncepto de reenkarniĝo instruita de la Spiritoj, unue, "surprizigis lin profunde"[3], ĝis la punkto kontraŭstari lin, pro esti tre diversa ke li mem havis rilate al la antaŭeco de la animo.

Unu el la pli interesaj aspektoj de la artikolo, tamem, okazas kiam Kardec faras serion da demandojn, ekde la hipoteza konsidero ke la reenkarniĝo vere ne ekzistus kaj ĉiu animo estus kreita okaze de la naskiĝo. Tiuj demandoj, kiel ni vidos, estos parto de pli ampleksa método kaj tre grava, el kiuKardec plurfoje uzos en siaj tekstoj kaj argumentadoj.

Inter la demandoj, ni trovas kelkajn kiel: a) Kial montras la animo tiom diversajn kapablojn kaj sendependajn ideojn ke la edukado ebligis lin akiri?"[4] b) De kie, en kelkaj infanoj, la frumatura instinkto kiujn ili malkaŝas por la malvirtoj aŭ por la virtoj, la denaskaj dignecoj sentoj, aŭ de maldigneco, kontraŭstarante kun la médio en kiu ili naskiĝis?[5]

3 Vidu Kardec-on, "Revuo Spiritisma", 407

4 Vidu Kardec-on, "Revuo Spiritisma", 412

5 Vidu Kardec-on, "Revuo Spiritisma", 412

*Krom tiuj, pli rekte ligitaj al la pasinteco kaj nuna tempo de la animo, li ankaŭ listigas kelkajn demandojn kiuj rilatas kun ilia estonteco, ekzemple: "Kia sorto atendas tiujn kiuj mortas dum la infaneco, se ili ne povis ankoraŭ fari nek la bonon nek la malbonon? Se ili iras al la médio de la elektitoj, kial tiu favoro se nenion ili faris por meriti ĝin? Pro kiu privilegio ĉu ili fariĝas senriproĉaj pro la vivo ĉagrenoj?*[6]

*Kiel oni povas konstati, estas demandoj tre rilataj kiam ni analizas kadre de la homaro, tiel kiel la eblecoj, de la filozofa vidpunkto, por la estonteço de la estulo.*

*Sekvante en sia argumentado, Kardec do, uzas pli determinitan logikon, difinante la eblajn konkludojn kiujn oni atingas, ankoraŭ konsiderante la hipotezon de unu nura korpa ekzisto: aŭ la animoj estas egalaj aŭ naskiĝis malegalaj. En la unua kazo, kial tiom granda diferenco inter la kapabloj? Aliflanke, se ili estas malegalaj, estas ĉar Dio tiel faris ilin; Estus Dio, do, justa kaj senpartia kiel oni esperas de la Kreinto?*

*Oni rimarkas, tiamaniere, ke la liona majstro uzas metodon tre uzata de la logiko, nome, método de la neado aŭ malpliigo ĝis la absurdo, en kiu, resume, oni realigas supozon, kaj ekde tiu, kelkajn deduktojn. Se la deduktoj estas kontraŭdiraj aŭ absurdaj, do, la suzpozo unue prezentita estas malvera. Tiamaniere, Kardec volas konduki nin kompreni ke, supozante la neekzisto de la reenkarniĝo, ĝi kondukas nin al kontraŭdiroj ĉirkaŭ la Kreinto mem kaj Liaj leĝoj.*

*Tamem, por sekvi la rezonado de Kardec, oni necesas kompreni la ŝlosilan elementon kiun li uzas, ĝuste kiel kriterio por elmontri la deduktoj, ekde tiu komenca supozo, estus kontraŭdiraj aŭ absurdaj. Ni devas elaĉeti temon kiun estus poste elvolvigita, en la libro "La Genezo", sed jam estanta en lia tuta verko. Oni pritraktas studado pri la naturo de Dio, speciale pri Liaj atributoj. Ni vidu kiun li diras pri tio:*

*"Dio estas, do, la superega intelekto kaj suverena, estas unununura, eterna, neŝanĝebla, nemateria, ĉiopova, suverene justa kaj bona, senfina en ĉiaj perfektecoj, ne povus esti aliamaniere*

*Tia la akso sur kiu estas la universala konstruaĵo, kvazaŭ lumturo kies radioj entendiĝas sur la tuta universo, unununura lumo kiun kapablas gvidi la homon en la serĉo pri la vero. Orientiĝante per tiu lumo, li neniam elvagiĝos. Se, do, la homo eraradis tiom da fojoj, estas nur ĉar ne sekvis la vojmapon kiu estis indikita al li. (Kardec 2013, ĉapitro 2, 19)*

*Analizante pri profunde la verko de la Kodigado, ni rimarkas kiom Kardec uzis tiun universalan akson aŭ ĉi tiun lumon por analizi la plej malsamajn ideojn, teoriojn kaj konceptojn, origine aŭ ne de la spirita mondo, celante konstrui la Spiritisma Doktrino sur solidaj kaj sekuraj bazoj. Estis vere ŝlosila parto.*

*En escepta kaj gvidiga sintezo, li ankoraŭ aldonas:*

*Tia ankaŭ la tute certa kriterio de ĉiuj filozofa kaj religiaj doktrinoj. Por analizi ilin, la homo disponas strikte ekzatan mezuron el la atributoj de Dio kaj povas aserti tute certe ke ĉiu teorio, ĉiu principo, ĉiu dogmo, ĉiu kredo, ĉiu praktiko kiu estas en kontraŭdiro kun unu nura de tiuj atributoj, kiu emas ne nur nuligi ĝin, sed simple malpliigi ĝin, ne povas esti kun la vero" (Kardec 2013, ĉapitro 2, 19).*

---

6 Vidu Kardec-on, "Revuo Spiritisma", 414-415

*La apostolo Tiago, en sia epistolo diras ion similan: Ĉiu bona dono kaj ĉiu perfekta naturdono devenas de la altaĵo, devenas de la Patro de la lumoj, en kiu ne estas ŝanĝo nek ombro de variado." (Tiago 1:17). En Dio, do, ne estas ŝanĝo aŭ ombro de variado, tiel estas, Li kiel Liaj atributoj estas neŝanĝeblaj, perfektaj kaj ne kontraŭdiraj, estante, do, ne malsukcesa kriterio, ĉiam, por ia analizo de iu aspekto de la kreado.*

*Kompreneble, ni ne havas intencon, nun, por kompreni ĉiun intiman naturon de Dio. Mankas al ni sentojn por tio,[7] kiel klarigas nin la Spiritoj en la 10-a demando el "La Libro de La Spiritoj". Tamen, Kardec asertas majstramaniere: "Ni ne scias ĉion kio Li estas, sed ni scias tion ke Li ne povas ne esti" (Kardec, 2017, demando 16). Tiamaniere, ekde tio kion ni povas koni pri Dio, ni havas serion da kriterioj kiuj permesas nin distingi se ia doktrino, ideo aŭ teorio des pli malproksimiĝas de la vero, ju pli neas aŭ simple malpliigas unu el la atributoj de la Kreinto.*

*Kadre de tiu kazo, do, Kardec prenas la atributojn de Dio kel referenco, pli specife, la atributo de supera justeco – por konkludi ke, ĉe la neekzisto de la reenkarniĝo, ni alvenus al ia neado aŭ malpliigo de tiuj atributoj, kaj do, al absurdo, indikante ke la deira supozo, ke la reenkarniĝo ne ekzistas, estas malvera.*

*Tial, la Spiritoj mem, en konsonanco kun ĉi tiu método, kiam demanditaj de la Kodiganto pri kiu fundamentas la verecon de la reenkarniĝo, en la demando 171 el la Libro de la Spiritoj, ili respondos: "En la justeco de Dio kaj en la revelado" (Kardec 2017, demando 171). Tio signifas diri ke, krom la reveladoj de la Spiritoj mem pri la reenkarniĝo, surmetitaj al la Universlala Kontrolo de la Instruado de la Spiritoj,[8] la atributo de justeco de Dio estas la plej fundamenta elemento por garantii la Veron de ĉi tiu doktrino, unufoje ke supozante na neekzisto de la reenkarniĝo, tutecerte ni alvenus al kontraŭdiro aŭ neado de ĉi tiu atributo. Tiel estis ke Kardec mem sin konvinkis.*

*Ni prenis ĉi tiun kazon de Kardec, pri la temo plureco de la ekzistadoj por ilustri, en pli ĝenerala aspekto, la gravecon de ĉi tiu método de rezonado, uzita de la Kodiganto, baze de la logiko kaj en la atributoj de Dio, tiel kiel estis kaj daŭras estante, en la konstruado de la Spiritisma konado, vera centra akso, bazŝtono por niaj analizoj, studadoj kaj konkludoj. Ke ni neniam malprokisimiĝos de ĉi tiu klereco kaj logiko kiuj transmontriĝas el la penso kaj de la verko de la neforgesebla fondanto de la Spiritismo, kaj ni havos pli da sekurecon de iri tra bonaj vojoj serĉante la veron kaj spiritan progreson.*

## BIBLIOGRAFIO


KARDEC, Allan. 2014. "Plureco de la Korpaj Ekzistadoj". *Revuo Spiritisma*. Brasília: FEB. [Jaro I, N. 11 (nov. 1858): 406-415]. Kindle.

KARDEC, Allan. 2013. *La Genezo*. Brasília: FEB. Kindle.

KARDEC, Allan. 2013a. *La Evangelio laŭ la Spiritismo*. Brasília: FEB. Kindle.

KARDEC, Allan. 2017. *La Libro de la Spiritoj*. Brasília: FEB. Kindle.


7 Vidu Kardec, "La Libro de la Spiritoj", 10-an demandon;

8 Vidu Kardec-on, "La Evangelio laŭ Spiritismo", Enkonduko, II.

# SPIRITISMO KAJ RELIGIO
# KARMAJ EMBARASOJ KAJ MALUTILAJ RIĈAĴOJ



Aluizio Ferreira Elias

**ALUIZIO ELIAS**

**BIO:** Kunlaboranto de la Spiritisma Grupo Eurípedes Barsanulfo de Uberaba/Minas Gerais/Brazilo.

**TRADUKISTO:** Maria Aparecida Tuon

**RESUMO:** Ĉi tiu artikolo esploras la spiritisman nocion de Plureco de ekzistadoj surbaze de iu kazo-analizo. La teksto prezentas kaj komentas la reenkarniĝan vojon de Antero de Oviedo (Robbie Vilamil) en du sinsekvaj vivoj, rakontitaj en la romano Renúncia; verko de Emmanuel kaj psikografio de Chico Xavier. La artikolo celas prezenti ĉi tiun literaturon en ties analiza akso por reliefigi la karmajn embarasojn rezultantajn de malbona riĉeco, konstruita koste de aliulaj suferoj.

**ŜLOSILVORTOJ:** Reenkarniĝo, Karma elaĉeto, Uzuro, Sklaveco.

Kiam Kristo, en 19:24[9], asertas ke "*estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio*", li aludas la spiritajn defiojn, kiujn la travivaĵo sur la fizika mondo, vivita meze de mono kaj komforto, povas trudi al iu ajn reenkarniĝinta homo. Certaj raportoj el la spirita mondo konfirmas la supozojn de tiu ĉi biblia instruo kaj atentigas nin pri la rilato, kiun ni, enkarniĝintaj homoj, havas kun la materiaj bonaĵoj, kiujn riĉeco povas aĉeti. Inter la rakontoj, kiuj traktas tiun ĉi temon kaj plej impresas nin, elstariĝas la vivo de Antero de Oviedo, rolulo en la libro *Renúncia* de Emmanuel, psikografio de Chico Xavier. Antero, homo kore aliĝinta al familio Vilamil, plenumas en la intrigo la rolon de malbonfaranto persekutanta la geedzojn Madalena kaj Cirilo. La legantoj de *Renúncia* ofte memoras tiun ĉi rolulon, ĉar li estis la intelekta mentoro de la plano, kiu apartigis la gepatrojn de la heroino Alcione en la fizika vivo.

Tamen en nia teksto ni observos la spiritan tragedion de Antero el alia vidpunkto. Ni atentos lian rilaton kun la bonaĵoj, lian aprezon por ĉiaj luksaĵoj. Post ĉi tiu engaĝiĝo al la "bona vivo" (bone manĝi kaj trinki, konforte loĝi, bone vestiĝi), ni neeviteble identigos la absolutan neceson kiu instigis lin trovi la rimedojn, kaj malhumanajn kaj malhonestajn, por amasigi la kapitalon kiu subtenus lian abundegan vivstilon. Cetere, Antero estis *bon vivant* dotita de unika talento por la komerca mondo.

---

9 Dias, "O Novo Testamento"..

Gravas memori, ke kapitalismo, en sia ĉefmanifestiĝo, povas esti difinita kiel formo de interkontinenta merkantilismo. La eŭropa burĝaro akiris absurdajn profitojn el komercado de manĝaĵoj kaj ekzotikaĵoj akiritaj en Afriko, Ameriko kaj Azio. En ĉi tiu sama varfluado trans la oceanoj, estis ankaŭ la makabra komerco de sklavigitaj homoj. Antero de Oviedo konstruis sian heredaĵon pere de la komerco de nigruloj kaj indianoj malliberigitaj en Afriko kaj Azio, transformitaj en kaptitajn varojn.

Ni atentu la momenton, kiam Federigo Izaza, hispana spertulo pri la triangula komerco inter Ameriko, Afriko kaj Eŭropo, proponas al li investojn ligitajn al sklavkomerco.

"Antero konfesis la intencon investi la kapitalon alportitan el Francio ĉe la perspektivo de bona komerco. Izaza, sen ke li rimarku, havas strangan brilon en siaj akraj okuloj kaj ekkrias:

*— Nu, vidu, kia feliĉa hazardo kunigas nin! Okazas ke ĝuste nun mi havas enmane la plej bonan negocon lastatempe.*

*— Kiel do? — demandas la junulo, scivoleme.*

*— Ĉu vi konas la sklavmerkaton por fremdaj kolonioj?*
*Fronte al la mirigita aspekto de la interparolanto, Federigo daŭrigis ekscitiĝinte:*

*— Ĝi estas la plej profita negoco nuntempe. Kiel vi ne povas ignori, la nova Kontinento bezonas sklavan brakon. Elmigrintoj el Eŭropo ne povus prilabori la krudan terenon memstare; epidemioj, malfacilaĵoj, densaj arbaroj detruus ties delikatajn organismojn. Per kelkaj ŝipoj kaj kelkaj fidindaj homoj, eblas akiri fonton de optimumaj profitoj, kun preskaŭ sensignifa peno.*

*— Sed… Kiel? — demandis la alia.*

— Necesas nur kelkaj bravaj ŝipoj, kiuj periode vizitas la Afrikan Marbordon.

— Ĉu nur tio?

— Nenio pli. Interŝanĝe de senvaloraj objektoj, ni akiras grandan nombron da sovaĝuloj, kiuj, malgraŭ kaptiteco, ekas ĝui la avantaĝojn de civilizacio. Tiamaniere — klarigis Izaza en egoisma sinteno de homo kiu maskas ruzajn celojn — krom obteni profitajn transakciojn, ni ankaŭ disdonas bonaĵojn inter la barbaraj nigruloj, kun primitivaj kutimoj. […] Mi kredas, ke vi alvenas al Hispanio en oportuna tempo por viaj interesoj, ĉar miaj fratoj kaj mi bezonas kapitalisman partneron por antaŭenigi grandajn iniciatojn. Havante nur unu ŝipon, ni maltrafis grandajn ŝancojn en la plej profitaj merkatoj. La anglaj, francaj kaj portugalaj kolonioj estas grandaj konsumo-centroj.

La sagaca amiko detaligis kaj emfazis la gravecon de tiaj facilaj profitoj, allogante sian kunulon al risko de egaj aventuroj. La konversacio ripetiĝis dum la tuta vojaĝo, kaj, kiam ili elŝipiĝis en Valencio, Antero de Oviedo jam estis konvinkita pri la avantaĝoj de nigra trafiko kaj decidis partopreni de la firmao kun ĉiuj disponeblaj rimedoj." (Xavier 2006, 88-9)

Pluraj estas la moralaj danĝeroj al kiuj la animo estas submetita kiam ĝi estas fascinata de komforto. Unue, ĉar subteni la "bonan vivon" implicas, en la plej bona kazo, fari el komerca laboro aŭ profesia kariero absolutan prioritaton, malprofite de iuj ajn personaj rilatoj. La persono magnetizita de la lukso fariĝas sklavo de sia propra konsumismo kaj devas submetiĝi al la homa leĝo, kiu interligas la kvanton de kapitalo al la nivelo de engaĝiĝo kun la salajrata laboro. La kazo iĝas gravega kiam la dependo de mono psike malsanigas la viron ĝis la endanĝerigo de la percepto de kio estas etika. Troa gusto por konsumi multekostajn aferojn damaĝas la homajn valorojn; la ligiloj de solidareco malstreĉiĝas, kaj la aliulo, iom post iom, fariĝas ŝtupo por esti tretita aŭ manipulita de tiuj, kiuj ĉiakoste deziregas supreniri kaj socie kaj ekonomie.

Krom la malhumanigo de la aliulo (la sklavo, la servisto, la dungito), ĉiam rigardata kiel laboristo aŭ konsumanto de varoj kaj servoj, la sensualisma homo, fascinita de la ĝojoj, kiujn la mono alportas, perdas la prudenton, la ekvilibron de emocioj, kaj ekagas sub la premo de difuzaj fortoj. Li ekspluatas kaj estas ekspluatata; li fascinas kaj estas fascinata nome de ekstravagancoj, kiujn li mem antaŭmetas kiel bezonatajn. Antero "uzis la plej grandan parton de sia riĉaĵo en la aventuroj de la sklavkomerco", esperante ekhavi facilan kaj abundan profiton, sen pripensi kiom multe da sango kaj larmoj estos verŝitaj por ke la riĉeco atingos liajn manojn.

Lia monsoifo estis tia, ke li fine "faris gravajn ŝuldojn antaŭ ruzaj kaj neflekseblaj uzuristoj kaj financistoj" ĝis li trovis sin neripareble engaĝita en la merkantilismo de tiu tempo. La kontraŭpezo estis serĉita de li en "gajaj noktoj, plenaj je plezuroj kaj multekostaj vinoj". Eĉ en siaj familiaj rilatoj "li komentis nenion alian ol la avantaĝojn de facila oro". La fakto estas ke, je ia punkto, "estis multe da mono por malĉasta distraĵo".

Aperis rimedoj kaj pligrandiĝis la mono postulata de la komforto, ĝis, neeviteble, la mono elĉerpiĝis. Antero fiaskis honori siajn financajn ŝuldojn; la bonega vivstilo kostis pli da mono ol la entreprenoj povus provizi. Lia kredito en la merkato prokrastis la bankroton dum kelka tempo. Tamen alvenis la fakturo de liaj ekscesoj kaj, samtempe, "la kreditoroj de D. Antero postulis la pagon de liaj ŝuldoj". Ĉe la bankroto de lia firmao kaj la konfisko de ĉiuj havaĵoj, "Antero de Oviedo estis trovita morta, en Madrido, apud la Toledo Pordego". Multaj komentis, ke la juna komercisto "preferis memmortigon al malhonora malliberejo". Tio, kion Emmanuel do rakontas, estas tipa en cirkonstancoj similaj al tiuj de Antero. Post sia tragika senkorpiĝo, li rekonis sin "en regiono de densaj ombroj" riparanta "per ĉagrenitaj larmoj la malprudentan pasintecon". Li volis aŭdi homan voĉon, liberigi sin de tiu konsterna silento, sed foje li havis la impreson, ke li aŭdis "konfuzajn bruojn de moka ridado, kiuj preskaŭ konvinkis lin, ke li estis gvatata de netuŝeblaj malamikoj".

Tiel Emmanuel priskribas la bedaŭrindan situacion de Oviedo:

“La rememoroj pri la sklavkomerco terurigis lin. Li vidadis la aĉajn scenojn de la sklavŝipoj, kiam foje li vizitis tiujn ĉe la afrika marbordo. Kaj li aŭdis la lamentojn kaj malbenojn de tiuj, kiuj estis devigitaj apartiĝi de siaj amatoj. Ĉio venis en lian doloran menson, kun mirinda viveco kaj klareco. [...] Li tremis, kriis, neniigis sin ene de sia grandega doloro. Tamen, la fakto, kiu plej impresis lin, estis ke lia dekstra mano estis velkinta, kaj unu el la piedoj estis seka! La mallumo malhelpis lian vidadon, sed, de tempo al tempo, per dolora tuŝo, li ekkomprenis la strangan anomalion.” (Xavier 2006, 111)

Post du jaroj en tiu turmentega regiono, la malprudenta komercisto kortuŝe preĝis, petante al Dio "almozon de lumo meze de la mallumo envolvanta lin". Kiel respondo al liaj petoj, ekaperas Sinjorino Margarida Vilamil, lia spirita patrino, alportante konsolon al Antero. La matriarko Vilamil demandas al lia konscienco: "Ĉu vi iam pripensis la rezultojn de la entreprenoj, kiujn vi efektivigis en la mondo?". Margarida tiam parolas al Antero pri reenkarniĝo kiel la unika ŝanco por ripari kaj rafini ies personecon. Ŝi klarigas al li tion:

“La fizika korpo estas altvalora ŝirmejo, en kiu ni povas korekti aŭ plialtigi la animon, forviŝi makulojn de malluma pasinteco aŭ disvolvi diajn flugilojn por ekvilibrigi nin en plena spaco serĉante la superajn mondojn. [...] La pardono de Dio al la mallaborema farmisto estas en la ĉiujara ripeto de plantado." (Xavier 2006, 112)

Sinjorino Margarida, plifirmigante la pedagogian frazon, klarigis lin pri la karmaj kondiĉoj, kiuj ebligus al li elaĉeti siajn ŝuldojn al la homaro:

*“Vi havos nek la antaŭan fizikan belecon nek la plenan movo-liberecon, precipe ĉar vi revenos al la mondo por klopodi resaniĝi; tamen, post kiam ĉesos la estontaj provoj, se vi scios rezigni viajn kapricojn, vi reintegriĝos en la spirita harmonio, por daŭrigi novajn evoluajn taskojn, en la karno aŭ ekster ĝi.”* (Xavier 2006, 113)

Jaron post tiu renkontiĝo, naskiĝis la unua filo de Dolores kaj João de Deus, paro da sklavoj de la riĉa Estigarribias-familio. La malgranda korpo de la infano elmontris certajn proprecojn. Krom okulaj problemoj, ties piedoj estis "kurbaj kaj retiritaj" kaj la manoj "nur havis du fingrojn". Ĉar Dom Alfonso Estigarribias *"ne permesis la ekziston de kripluloj en sia proprietaĵo"* oni postulis, ke la infano estu disponigita por adopto. Estis al Madalena kaj Alcíone Vilamil, kiuj suferis la malfeliĉajn agojn de Antero de Oviedo, prizorgi la bebon nomatan Robbie. La eta kripulo, malriĉa kaj filo de sklavoj, estis la reenkarniĝo de Antero, la ambicia sklavkomercisto. Jen koro en deviga kondiĉo de karma elaĉeto, kiu nun estus edukita de la sama familio, al kiu li iam kaŭzis tiom da sufero.

En la nuntempa mondo, regata de ekonomiaj praktikoj, ne plu estas profesiaj sklavistoj. Tamen daŭras la ekspluatado kaj de homoj kaj de la natura riĉeco en la nomataj periferiaj landoj, fare de famaj fabrikmarkoj kaj aplaŭditaj entreprenistoj.

Grandaj riĉaĵoj en la tutmondigita mondo estis konstruitaj, kaj daŭre estas, surbaze de la mizero de la plej malriĉaj loĝantaroj. La landoj kaj la familioj, kiuj regas la internacian merkaton, profitas la aliulan mizeron, nesufiĉe pagante la malriĉulojn en Afriko kaj elĉerpante la grundriĉaĵojn. La Demokratia Respubliko Kongo, ekzemple, provizas grandan parton de litio bezonata por la baterio de niaj saĝtelefonoj. Sed malmultaj el ni scias, ke la avideco ĉirkaŭ la litio situas ekster Kongo, sur aliaj kontinentoj, kaj estas nutrita de la interna milito, kiu disĵetas suferon kaj mortigas tiom da kongolanoj ĉiutage.

Sed kiu profitas el tio? Kiuj kompanioj kaj entreprenistoj? Aŭ pli bone dirite, kiom mi mem profitas el tio? En la fino, mia aliro al ĉi tiuj teknologiaj objektoj, kiuj uzas lition en siaj baterioj, pezos sur la ŝultroj de viroj, virinoj kaj infanoj subpremataj de la maljustaj reguloj de la kapitalisma mondo. Restas al mi do demandi tion:  Kiom da mastroj de sklavkomerco de la Klasika Koloniismo, en la 16-a jarcento, denove enkarniĝis kaj ripetis la samajn erarojn, ĉi-foje ekspluatante la novkolonian Afrikon en la 19-a jarcento? Ni ankaŭ pensu: Kiom da eŭropaj reĝoj, kiuj ekspluatis la novkolonian Afrikon, reenkarniĝis nuntempe kiel grandaj entreprenistoj kaj daŭre riĉiĝas el la ekspluatado de tiu sama kontinento? Ni racie konsideru ankaŭ, ke multaj aliaj sklavistoj de la 16-a jarcento kaj ekspluatistoj de la 19-a jarcento estas reenkarniĝintaj en la hodiaŭa Afriko kaj vivas en ekstrema malriĉeco, kiun ili mem iam helpis disvastigi. Ĉu eble, hodiaŭ, kelkaj el tiuj infanoj en situacioj de ekstrema malriĉeco, kiuj aperas en niaj internaciaj informiloj, estas tiuj, kiuj sklavigis en la 16-a jarcento kaj ekspluatis en la 19-a jarcento?

Fine ni pridubas tion: En kiaj doloraj karmaj cirkonstancoj la reenkarniĝo lokos ĉiun el tiuj grandaj sinjoroj de la mono, la baronoj de la nuntempa riĉaĵo, por ke ili povu liberiĝi el la kaptiteco de Mamono?! Kiuj edukaj procezoj elaĉetos ilin? Ĉar, ĉu pro doloro, ĉu pro bonfarado, unu afero estas neevitebla... *"La ĉielo kaj la tero ne forpasos, ĝis la lasta centono estos pagita"* (Mateo 24:35).

## BIBLIOGRAFIO

DIAS, Haroldo Dutra. 2013. *O Novo Testamento*. Brasília: FEB.

XAVIER, Francisco C. (Emmanuel, Espírito). 2006. *Renúncia*. Brasília: FEB.

## REDUTO DE MALLUMO

**TRADUKISTO:** Paulo Pires

De Honório Abreu[10]

En nia lernado ĉi tie, en la spirita dimensio, ni trovas benitajn okazojn, kondukantaj nin al profundaj pripensoj.

Ni estis trairantaj kaj ŝirmitaj en spirita Helpstacio, situanta en la malsuperaj regionoj, tre proksime al la terkrusto. Ĝi estas angulo de paco kaj lumo mergita en la mallumo, kiu ĉirkaŭas la medion. Centro de intensa laboro kaj sindona amo al proksimulo, fondita de frato Quintão[11], sentima spiritisto, kiu estis prezidanto de nia BSF.

La helpstacia konstruaĵo karakterizas per simpleco, malgraŭ la altaj muroj ĉirkaŭantaj ĝin, pro la evidenta kutima atako de centoj da tumultantaj spiritoj, kiuj vagadas en la ĉirkaŭaĵoj. La fortan gvatadon produktas ekipaĵaro, kiu preterpasas nian komprenon, sed kiu restas en perfekta harmonio, pro sekureco de la mensaj emisioj el tiuj respondecaj pri la institucia estrado.

Malmultaj ĉambroj estas tie, lokoj por studado kaj preĝado, kaj bone aranĝita flegistinejo, konservita sub la prizorgo de sindonemaj laboristoj. Ekzistas ekstera teamo, sekura kaj disciplinita, viva ekzemplo pri servistoj de la Evangelio, ne hezitanta penetri la torditajn amasojn da spiritoj portantaj la plej diversajn perturbojn kaj malharmoniojn.

Nek la infero tiel detale priskribita de la katolikaj fratoj prezentas tiel ŝokajn scenojn de doloro kaj dezerto. Elporti la animojn, kiuj estas tie perditaj kaj konfuzitaj, egalas al la laboro ĉerpi krudan oron el ŝlima kaj tumulta fluejo.

Mi partoprenis en unu el tiuj savadoj. Mi konstatas, ke ĝi estis io impresa kaj mi ja estis tre kortuŝita kaj pripensema pri la sufero de la malorientiĝintaj fratoj, kaj la laboro de sinofero farita de la dediĉitaj servantoj de Jesuo.

Tie mi troviĝis kiel nura observanto, ĉar nek kiel metilernanto tiu pozicio permesus al mi. Mi atestis la amon ekzempligitan de viroj kaj virinoj, el kiuj multaj okupis elstarajn poziciojn en la socio en kiu ili vivis, dum ili estis enkarniĝintaj: ili brakumis la malfeliĉajn suferantojn, akceptante ilin kun ĝojo; Ili plenumis sian agadon en senpretenda kaj anonima maniero, kiun la homa rigardo, ankoraŭ fokusita al la interesoj de transiraj aferoj, ne rimarkas.

La putra aero, la malpuraĵo, kiu estis sur la perispirito de tiuj suferantaj animoj, estas vere io doloriga por vidi. Tamen la karesaj brakumoj de la bonaj laboristoj pruvis, ke ilin ne ĝenas la ŝlimecaj vibroj, kiuj fluis de la kapo al la piedoj de tiuj senhavaj fratoj, saturitaj per karapaco de venenaj kaj degradaj fluidoj, similaj al gluanta koto, plena je putrado.

---

10 **Honório Onofre de Abreu** (12/06/1930, Belo-Horizonto, Brazilo, ĝis 13/11/2007, Belo-Horizonto, Brazilo), estis oficisto de Banko de Brazilo, kie li plenumis elstarajn funkciojn. Li helpis fondi la Spiritisman Grupon Emmanuel, la 10an de novembro 1957, kaj prezidis la Minas-Ĵerajsan Spiritisman Unuiĝon inter 2002 kaj 2007.

11 **Manoel Justiniano de Freitas Quintão** (28/05/1874, Valenso, Brazilo, ĝis 16/12/1955, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo), estis brazila ĵurnalisto, verkisto kaj spiritisma mediumo, kiu prezidis la Brazilan Spiritisman Federacion en 1915, 1918, 1919 kaj 1929.

Ni dankas al frato Quintão kaj al ĉiuj aliaj oficistoj de la humila Centro pro la lernado, pro la ŝanco atesti veran ekzemplon de amo al Dio kaj proksimulo.

Honório Abreu

Psikografia mesaĝo ricevita de Marta Antunes, en la 5a de novembro 2023, ĉe BSF.

## SPIRITISMO KAJ SOCIO
## LA SPIRITISMA DOMO: GRAVECO, EBLECOJ KAJ NOTOJ



Bruno Quintanilha

**BRUNO LINS QUINTANILHA**

**BIO:** Bruno Lins Quintanilha aktivas ĉe Spiritisma Societo Sorella kaj Spiritisma Domo Eurípedes Barsanulfo, ambaŭ en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazile. brunolquinta@yahoo.com.br

**TRADUKISTO:** José Roberto Alves de Albuquerque

**REVIZIISTO:** Givanildo Ramos Costa

**RESUMO:** La temo de ĉi tiu artikolo estas la spiritisma domo kaj ĝia celo estas kundividi pripensojn, eblecojn kaj notojn pri socia agado de la spiritismaj institucioj ĉe la komunumoj kaj socio.

**ŜLOSILVORTOJ:** Spiritisma domo, Socia Funkcio, Spiritismo kaj socio.

Spiritismo estas, laŭ mi, kona kampo – ankoraŭ malmulte esplorita –, spiritualisma filozofio kaj stimulo al libera, malferma kaj aŭtonoma religieco.

Kiel kona kampo, ĝi serĉas esplori kaj kompreni la rilatojn inter la Spiritoj kaj la homoj. Kiel spiritualisma filozofio, Spiritismo demandas pri tio, kio estas strikte transa materio, pripensante pri la konsekvencoj de la anima senmorteco kaj la rilatoj inter la Spiritoj kaj la homoj. Ekde siaj ĉefaj konceptoj (mediumeco, Spirito, Dio, evoluo kaj reenkarniĝo) kaj sia etiko (surbaze de respekto, empatio, neperforto kaj altruismo), Spiritismo povas stimuli la religiecon, tio estas, la konekton de la individuo kun io supera, sed konekto sendependa de institucioj, lokoj kaj reguloj[12].

Ĉi tio estas resume tio, kion mi komprenas, kio estas Spiritismo. Laŭ ĝia disvastiĝo al pliaj homoj kaj lokoj, ekaperas institucioj, kiuj celas ĝin studi, dissemi, praktiki, uzi por la persona kaj socia elvolviĝoj. En tiuj lokoj kunvenas ĉiuj, kiuj iel interesiĝas pri Spiritismo kaj ties eblecoj. Tiujn instituciojn, lokojn, ni nomas nuntempe spiritismaj centroj, spiritismaj societoj, spiritismaj domoj ktp.

En ĉi tiu mallonga teksto, mi ŝatus enfokusigi la eblecojn, kiuj la spiritismaj domoj povas proporciigi krom Spiritismon en si mem. Anstataŭ spaco, kie nur okazas prelegoj, kursoj aŭ mediumaj kunsidoj, mi taksas, ke la spiritisma domo bezonas esti spaco de interrilatiĝo, renkontiĝo, travivadoj kaj kunvivado, spaco, kie ni povas koni malsamajn homojn kaj pensmanierojn, konstrui ligojn, protektretojn, helpretojn; esti sekurspaco, kie la individuo povas trovi akcepton sen ia ajn juĝo al

12 Por vidi la Kardec-referencon rilatan al difino de Spiritismo, mi rekomendas la legadon de la antaŭparola fino de la verko *Kio estas Spiritismo*, de Allan Kardec.

sia persono aŭ al sia pasinteco, akcepton sendependan de sia socia klaso, raci-etik-deveno, sekso, seksa orientiĝo, aspekto aŭ eĉ religia opcio.

Kvankam iu ajn spiritisma institucio estas formita de homoj kaj tial havas siajn kontraŭecojn, manklokojn kaj plibonigendajn punktojn, ili bezonas ĉiam havi kiel celon la fratecon, la amon kaj sian daŭran pliboniĝon, por ke ili povu akcepti, tiom kiom eblas kaj laŭ siaj eblecoj, ĉiujn, kiuj ilin serĉas.

Krome parto de la spiritismaj domoj ankaŭ estas spaco, por ke ili asistu la plej sociajn vundeblajn homojn per nutraĵdonaco, vestaĵoj, kursoj, konsultadoj kuracista, dentista, psikologa, jura ktp. Ĉiuj tiuj servoj postulas, por ke ili povu funkcii, relativan kvanton da volontuloj – depende de grandeco de la institucioj kaj dimensio de la laboroj –, de homoj disponigantaj siajn tempon, bonan volon, kvalifikon kaj preparon por akcepti, helpi kaj labori. Tiuj volontulaj spertoj povas ŝanĝi vivojn, havigi travivaĵojn, kiuj povas forte impresi la percepton kaj vidadon de mondo kaj socio de tiuj, kiuj iĝis volontuloj. Tiusence la volontulado en iu ajn spiritisma institucio – aŭ ankaŭ ne spiritisma – povas esti intense formanta kaj transformanta sperton. Oni scias, ke multloke spiritismaj domoj faras elstaran socian servon, provizante mankojn devenantajn de la Ŝtata kaj socia preterlasoj[13].

Apud tio mi taksas, ke spiritismaj domoj ankaŭ povas esti spacoj por intelekta kaj civitana formado de la plej socie vundeblaj popoloj, al kiuj ili servas. Kiam kaj se eblos, inviti kuracistojn por paroli pri sano, zorgoj kun la korpo kaj nutraĵo; alporti advokatojn kaj sociajn asistantojn por paroli pri la rajtoj, kiujn havas ĉiu individuo – kaj plejofte ili ne scias; alporti sociologojn por paroli pri  masklismo, rasismo, lgbtfobio, demokratio kaj demokratia kulturo, socia kaj komunum-politika organizado; alvoki psikologojn por trakti la gravecon okupiĝi sane kaj ekvilibre pri la propraj emocioj kaj sentoj, reliefigante la seriozecon de la zorgoj pri la mensa sano; konstrui projektojn direktotajn al adolta alfabetigo, lerneja plifortigo por infanoj, porenira kurso al fakultato por gejunuloj kaj plenkreskuloj, teatro, sportoj; starigi kulturon de zorgoj rilataj la spacon ĉirkaŭ la institucio kaj ĉe la komunumo. Mi atentigas, tamen, ke tiuj sugestoj estas notoj en ideala plano, ĉar ĉiu el tiuj laboraĵoj postulas grandegajn organizadon kaj laboron. Multaj spiritismaj institucioj estas malgrandaj, kalkulas je malmultaj volontuloj kaj ne havas materiajn kondiĉojn por pliampleksigi la laborojn. Kaj tute ne estas problemo en tio. Mi aparte preferas malgrandajn instituciojn, kiuj kvante malmulte faras, sed kun alta kvalito; Kardec mem, en la ĉapitro 29-a de *La Libro de la Mediumoj*, kuntekste de la deknaŭjarcenta Francio, rakontas pri sia prefero por multobliĝo de malgrandaj spiritismaj grupoj, anstataŭ la grandaj. La ĉi tie esprimitaj ideoj rilate la servojn kaj laborajn eblecojn temas antaŭe pri provokoj, pripensoj pri la multnombraj eblecoj de soci-kultura agado en la spiritismaj domoj, sen tio, ke ili nepre devas inkludi ĉiujn aŭ eĉ parton de tiuj laboroj.

---

[13] Taŭgas memorigi, ke multnombraj religiaj institucioj, el la plej diversaj devenoj kaj nomoj, faras tre signifan laboron pri helpo kaj subteno al socie vundeblaj homoj en Brazilo. Juliano Spyer, en la ĉapitro 22-a, de la kvara parto de la verko "Popolo de Dio: Kiuj estas la protestantoj kaj kial ili gravas", uzas la koncepton de *Neformala Socia Bonstato* por nomi la protektajn retojn, kiujn la eklezioj starigis en ĉirkaŭurbaj kaj malriĉaj teritorioj, kie la Ŝtato malĉeestas kaj preterlasas. Bonas noti, ke kvankam estas nobla kaj utila la asista laboro farita de la religiaj institucioj en lokoj kun vundeblaj loĝantaroj, la respondeco de tia subteno kaj socia asistado estas de la Ŝtato kaj nur ĝi havas kondiĉon kaj sufiĉan kapablon, per publikaj politikoj, plivaste kaj definitive priservi.

Mi ankaŭ taksas kiel fundamenta, ke la spiritisma domo bezonas esti spaco por ekzerco, formado kaj konstruado de demokratia kulturo; loko, kie ĉiuj rajtas paroli, kie gravaj decidoj povas esti konstruitaj kaj konsiderataj kiel eble plej multe en horizontala, travidebla kaj malfermita formo; loko, kie la dialogo kaj neperforta komuniko estas fundamentaj premisoj por interrilatoj.

La spiritismaj institucioj devas esti spacoj, kie katolikoj, protestantoj, umbandistoj, kandombleistoj, judoj, islamanoj, budhistoj, ateistoj ktp neniam sentas sin malŝatataj aŭ malrespektataj iun ajn manieron. Antaŭe ili bezonas esti loko, kie la interreligia dialogo povas okazi kaj prosperi, kie la malsamaj homoj lernas unuj kun la aliaj, kie la amo estas la unuo meze de diverseco. Ni ne forgesu, ke en la spiritismaj prelegoj kaj kursoj povas ĉeesti alireligiaj homoj aŭ eĉ senreligiaj; tiel estas fundamenta tio, ke la respekto kaj empatio ĉiam estu en la paroloj, ĉu de publika aŭ privata karaktero.

La spiritismaj domoj bezonas esti spacoj por antaŭenigo de homaj rajtoj, formado de aŭtonomaj kaj socie sentemaj individuoj, spacoj kiuj havigas ilaron por ke ĉiuj, kiuj ilin vizitadas, povu eliri iom plibonaj, materie, intelekte, etike aŭ spirite. La spiritismaj domoj kiel eble plej multe povu esti spacoj, kiuj ne okazigu nur studon kaj disvastigon de Spiritismo. Ili povu esti institucioj, kiuj faru diferencon socie kaj/aŭ kulture por plibono de la komunumoj ilin ĉirkaŭantaj kaj/aŭ por tiuj, kiuj ilin frekventas.

La celo de kiu ajn spiritisma institucio ne devas esti, laŭ mia opinio, fari spiritistojn, sed plenumi la ĉefan celon de Spiritismo: helpi en la persona, socia elvolviĝo kaj en la bonstata antaŭenigo. Se la individuo fariĝos spiritisto, tiu estos la malplej granda konsekvenco. Se la individuo, kiu vizitadis la institucion havis iun lernadon aŭ sperton, kiu lin faris pli sentema, konscia, altruista kaj respondeca homo – malgraŭ ke li ne fariĝos spiritisto -, mi taksas, ke Spiritismo kaj la spiritisma domo plenumis sian mision.

Fine valoras memorigi, ke kvankam la spiritismaj domoj povas esti spacoj ekstreme utilaj kaj elstaraj laŭ la spirita kaj socia vidpunktoj, lastkaze Spiritismo ne dependas de ili, ĉar perfekte eblas esti spiritisto kaj ne frekventi spiritismajn instituciojn. Miavide tio, kio difinas la spiritiston ne estas la frekvento al iu loko, sed antaŭe liaj etika konduto kaj konscio/adhero al la centraj konceptoj de Spiritismo. Allan Kardec, siavice, registras tion, ke oni rekonas la veran spiritiston “pro liaj morala transformiĝo kaj streboj por venki siajn malbonajn tendencojn.” Fine Jesuo mem, laŭ la biblia raporto, diris al la samarianino[14], ke alvenos la tempo, kiam Dio ne estos adorita en specifaj lokoj, sed en spirito kaj vero. Mi deziras, ke ni povu travivi nian fidon per la ama ekzerco, kiun ajn lokon, kie la amo estas necesa, ĉu en la spiritismaj institucioj, ĉu ekster ili, en la plej diversaj lokoj kaj situacioj.

14 Vidi la Evangelion laŭ Johano, ĉapitro 4-a.

## BIBLIOGRAFIO

KARDEC, Allan. La Evangelio laŭ Spiritismo [3-a franca eldono, reviziita, korektita kaj modifita de la aŭtoro en 1866]. Braziljo: Brazila Spiritisma Federacio.

KARDEC, Allan. La libro de la Mediumoj aŭ Gvidilo de la mediumoj kaj de la alvokantoj: Spiritismo eksperimenta [49-a franca eldono de 1861]. Braziljo: Brazila Spiritisma Federacio.

ROSENBERG, Marshall. 2006. Komunikado neperforta: teknikoj por plibonigi personajn kaj profesiajn rilatojn. San-Paŭlo: *Ágora*.

SANTOS, Elisama. 2020. Edukado neperforta: kiel stimuli memestimon, aŭtonomecon, memdisciplinon kaj rezistecon en vi kaj infanoj. Rio-de-Ĵanejro/San-Paŭlo: Paco kaj Tero.

SPYER, Juliano. 2020. Popolo de Dio: Kiuj estas la protestantoj kaj kial ili gravas. San-Paŭlo: *Geração Editorial*.

**Dankon al** Renata Strino, pro la revizio kaj kritikoj.

## SPIRITISMA MOMENTO
## DIO, KIE VI ESTAS?

**TRADUKISTO:** Paulo Pires

*Dio! Ho Dio! Kie vi estas, ke vi ne respondas?*

*En kiu mondo, en kiu stelo vi maske kaŝiĝas en la ĉielo?*

*Antaŭ du mil jaroj mi sendis al vi mian krion, kiu ekde tiam vane fluas tra la senfino…*

*Kie vi estas, Sinjoro Dio?…*

* * *

Tiamaniere, la poeto de sklavoj lanĉis sian petegon, en nomo de la suferanta Afriko, kiu havis siajn filojn elŝiritajn el sia brusto por esti venditaj tra la mondo.

Kiel li, en certaj momentoj de profunda doloro, ni direktas niajn lamentojn al la ĉielo: Kie estas Dio, kiu ne savis la vivon de mia filo?

Kie estas la kompatema Dio, kiu permesas al homoj esti lupoj al siaj fratoj?

Kie estas Dio, kiu ne malhelpas la grandajn katastrofojn? Kial Li ne regas la marojn, silentigas la vulkanojn kaj ordonas al la ŝtormoj trankviliĝi?

Kie estas Dio, kiu permesas al kelkaj malmultaj homoj elekti sin kiel posedantojn de justeco kaj mortigi siajn kunhomojn?

Kie estas Dio, kiu ne haltigas la murdistan brakon, kiu ne mutigas la buŝojn de kalumnio, kiuj detruas vivojn, la ĝeneraligitan malicon?

Kie ĝi estas?

Kaj, kvankam la sufero nin vundas per ruĝvarmaj ponardoj, inter niaj plorsingultoj, ni povos aŭdi la voĉon de la senmortuloj susurante:

*Dio estas en vi, Lia filo. Ĉioscia, ĉieesta. Li ĉion scias, ĉion vidas, ĉion prezidas.*

*Vi plendas pri reagoj de la naturo, forgesante, ke ĉi tio estas planedo, sur kiu oni alternas kaj ripetas pri provoj kaj kulpelpagoj.*

*Ĝi estas lernejo kaj lernado foje malfacilas. Ĝuste kiel por tiuj, kiuj volas grimpi la ŝtupojn de saĝeco, la studaj horoj fariĝas peniga.*

*La doloroj, kiuj vin atingas, estas tiuj, kiuj provas vian reziston, kiuj defias vian inteligentecon, kiuj vin kreskigas.*

*Nenio okazas hazarde kaj ĉiu troviĝas ĝuste tie, kie li devas esti, en tia ĝusta momento.*

*La konvulsioj de la planedo konsistas en restruktura movado de progresanta mondo. Materiala progreso. Oni ŝanĝigas la pejzaĝojn, sanigas lokojn.*

*La frenezoj kaŭzitaj de homoj estas produkto de la libera volo, per kiu Dio ĉiujn dotis. Ankaŭ vi ĝin havas por kreski, profitante la lecionojn, kiuj vin batas.*

*Kontrolu, ke ĉiuj grandaj homoj atingis gloron en scienco, arto, heroaj faroj, pro sia forta volo venki.*

*Ankaŭ vi povas. Dio deziras vin feliĉa, post pasinta la ŝtormo troviĝanta en via animo.*

*Forpasos la sufero, kiu vin atingas. Ĉio forpasiĝas. Kiuj kaŭzas malbonon, tiuj respondos laŭ siaj frenezaj agoj, baldaŭ aŭ iom poste.*

*Nenio malĝustas en ĉi tiu grandega mondo de Dio. Kaj Li konas la doloron de via animo, la malsaton pri justeco de tiom da, la nekoherecon kaj frenezecon de multaj.*

*Ne malesperu. Permesu al vi aŭskulti la voĉon, kiu parolas: "Mia filo, vi min vokis. Jen mi."*

*Vi ne estas sola. Mi estas kun vi. Estu forta. La suno rebrilos, la problemo havos solvon.*

*Ne ploru pro manko de la amatoj. Ili estas kun vi. Ili translokiĝis de unu sfero al alia. Viaj mortintoj staras."*

* * *

Se vi ekzamenos ĉion per perspektivo de justeco, vi komprenos, ke ĉio estas ĝusta, en la plano de Dia Kreo.

Trankviligu vian animon. Permesu al vi senti la dian kareson en via propra intimeco. Ĉio trankviliĝos. Kredu.

Redaktita de "Momento Espírita" (Spiritisma Momento),

kun la komencaj versoj de la poemo "Vozes da África" (Voĉoj el Afriko),

de la brazila poeto Castro Alves.

## INTERVJUO JACOBSON TROVÃO

**TRADUKISTO:** Saulo Salgado Wanderley

Krom sia fundamenta rolo kiel nacia kunordiganto de la Mediumeco-Areo ĉe la Nacia Federacia Konsilio de Brazila Spiritisma Federacio, Jacobson Trovão estas docento, advokato, Urba Prokuroro (Goiânia, Brazilo) kaj bakalaŭrigada kaj postbakalaŭrigada profesoro pri juro.

Li estas ankaŭ aŭtoro de la libroj "Psikofonio en la verko de André Luiz" kaj "En la sabloj de Kapernaumo" - Fabeloj kvazaŭ okaziĝantaj (ambientigataj) en la tempo de Jesuo. Li publikigas artikolojn en la revuo Reformador, periodaĵo de Brazila Spiritisma Federacio kaj prezentas la semajnan programon "Studante la Libro de la Mediumoj", en la kanalo FEBTV ĉe Jutubo.

Li estas studemulo kaj respektata voĉo en la kampo mediumeco, al kiu li dediĉadas sian tempon, kontribuante por pli bona kompreno kaj spirita komforto de tiuj, kiuj serĉas respondojn kaj orientadon.

**Komence, ĉu vi povus iomete paroli pri via rolo kaj respondecoj kiel landa kunordiganto de la Mediumeca Areo ĉe la Nacia Federacia Konsilio de Brazila Spiritisma Federacio?**

Unue mi dankas al Revuo Spiritisma pro la amikeca invito al tiu ĉi dialogo, preĝante al Jesuo, ke li subtenu la Internacian Spiritistan Konsilion, por ke ĝi plue marŝu, daŭrigante la laboron de nia Kodiganto Allan Kardec.

La Nacia Kunordiganto de la Areo de Mediumeco de la Nacia Federacia Konsilio de la FEB havas la respondecon, kune kun la ŝtataj federacioj kaj la federacia distrikto, stimuli, antaŭenigi kaj disvolvi la studadon kaj praktikadon de la mediumeco, laŭ la Spiritisma Doktrino, en la amplekso de la spiritismaj institucioj de Brazilo.

La celo estas formi reton de laboristoj kies atento estas turnata al la mediumo, ĉu nova ĉu veterana mediumo.

Ĉu vi povus mencii kelkajn rimarkindajn spertojn aŭ kazojn, kiuj elmontras la potencon kaj validecon de la mediumeco?

Ni havis tra la historio esceptajn mediumojn, tiel rivelitaj de Spiritismo, kiuj per sia ofero kaj humileco kontribuis kaj daŭre kontribuas, inspirante la homaron al la alta spiriteciĝo. Ni povus, celante nomi nur kelkajn, reliefigi la dukorpecon de Santo Antônio de Pádua, la leviĝojn de Cupertino, la ekstazon de Tereza d'Ávila, la inspirojn de Joana D´Arc, la mediuman apostoladon de Francisco de Assis, la klarvidecon de Emmanuel Swedenborg, la usona mediumo Andrew Davis, la

"Profeto de la Nova Revelacio", la dialogoj kun la mortintoj de la Fratinoj Fox, la materiigoj de Eusápia Palladino kunportanta Katie King al mondo de la formoj, la psikografio de la fratinoj Boudin, la levitaciiĝoj de Daniel Dunglas Home, la pli ol 400 libroj psikografiitajde Chico Xavier, la astrala vivo de Yvonne do Amaral Pereira kaj Divaldo Pereira Franco, donante voĉon al la lumigitaj Spiritoj.

Ni ne povas forgesi la egiptajn kaj hinduajn inicitojn, la hebreajn profetojn, la pitoninojn, la ŝamanojn kaj paĵeoj, spektaklaj mediumoj, elmontrantaj mediumecon kiel enecan al la progreso de la homaro.

Mediumeco venis por la homaro, ne por tiu aŭ por tiu alia.

**Spiritismo emfazas la bezonon de studo, disciplino kaj karitato. Kiel ĉi tiuj principoj rilatas al la mediumeca praktikado?**

Studo, disciplino kaj karitato konsistigas la tripiedon de sublimigita mediumeco. Gravas konsideri, ke la mediumisma fakultato ne estas en si mem bona aŭ malbona. Ĝi estas humanviva karakteriza faktoro, kiel vidi, aŭdi aŭ paroli. Ĝi estas, do, neŭtrala. Scio, praktiko de karitato, dediĉo, humileco, malintereso, moraleco faras la diferencon. Ĉi tio estas kutime nomata "mediumeco kun Jesuo". Ĉiu mediumo povas kaj devas transformi sian mediumecon en mesianaton. Misio estas tasko. Plenumi ĉi tiun taskon estas apostoliĝi sub la nomo de Kristo, en senkondiĉa sin ofero al amo, favore al si mem kaj al aliaj. En la Biblio estas starigata ĉi tiun saman tripiedon, en la kleraj vortoj de Jesuo: "fido, preĝo kaj fasto". Alivorte, en spiritismaj konceptoj, rezonata fido, kondiĉata al studo, harmonio akirata per preĝo kaj la praktikado de bono, kaj la mensa, emocia kaj sentimentala disciplino simboligata en la fasto. Tiel, la mediumo, flankenlasante "ĉion voli kaj ĉion fari", kiel instruas al ni la Universala Mentoro Emmanuel, iĝas kapabla servi kun la Grandaj Animoj.

**Ĉu la plej multo da homoj opinias ke mediumeco rilatas nur al resanigo kaj spirita helpo al bezonantoj? Por vi, kio estas la vera signifo de mediumeco hodiaŭ?**

Mediumeco rilatigata ekskluzive al resanigo kaj spirita helpo al bezonantoj estas la komuna, valora, sed iom malvasta kaj reduktisma vidpunkto. Minimumigi la efikon de mediumeco sur la vivo de homo devenas de la ĝenerala atavismo indikanta ke mediumo estas nur tiu, kiu kapablas psikografii, paroli sub influo/diktado de spiritoj, klarvidi kaj aliaj pozitivaj fenomenoj. Spirita resanigo kaj spirita helpo al bezonantoj estas signifaj aspektoj de mediumeco, sed ili formas nur unu flankon de la mediumeca fakultato. Enfermita en la mediumeca kuniiĝo, kiel multaj asertas, mediumeco estas nenio alia ol fonto de materialigantaj fenomenoj, kiuj malproksimigas la individuon de la unua celo de tiu ĉi sublima fakultato, tio estas, spiritecigi la homon.

Mediumeco estas la ekstera esprimo de la mediumeca fakultato, de kiu ni ĉiuj estas portantoj, kiel dirite de Allan Kardec. Mi aparte komprenas, ke inter la multaj kontribuoj, kiujn Spiritismo alportis al la homaro, ĉiuj tre valoraj, elstaras du: la observado de la ekzisto de la Spirito, kiel homa ento, postvivanta al la morto de la fizika korpo; kaj la rimarkindaj pruvoj de la mediumeca senco, tute nekonata de la homa scienco, sed kiu provokos novan direkton en la esploro de la psiko. Kvankam la scienco, komenciĝanta en aferoj de la Spirito, limigita al materiaj rimedoj, ankoraŭ ne povas aserti la ekziston de ĉi tiu fakultato aŭ senco, la tiel nomataj paranormalaj psikaj potencialoj evidentigas ĝian agadon. Ni devas konkludi ke, antaŭ tiom da efikoj, nepre devas esti io pli en la menso, kiu iras trans la kvin konataj sentoj. Ia kaŭzo.

Klarvido, telepatio, somnambulismo, aŭtomata skribado, nepatologiaj ŝanĝataj konsciaj statoj trovos sekuran klarigon el la studoj de Allan Kardec pri la mediumeca fakultato.

Pliklarigante la temon, ni havas la Spiriton Emmanuel, tra la mediumeco de Chico Xavier, difinante mediumecon, enkonduke, en la libro Mediumeco kaj Agordo (FEB/CEU): "Mediumeco estas mensa forto, kreema talento de la animo, komunika kaj interpretkapablo de la Spirito, enece al la propra estaĵo."

En konciza komento, en la amplekso de nia limigata interpreta ebleco, ni devas konsideri "Mensan Forton", kiel la tutan gamon da agoj de la enkarniĝinta Spirito sur la perispirito kaj fizika korpo. Ĉi tiu ago estas ebligita de la pineala glando, kiu esence agas sur la esenca fluido, la materikorpa magneta fluido kaj la elektra fluido. Tia triunua forto, kiu cirkulas en la perispirito, ekspansiiĝas al la fizika korpo, ordonas ĉiujn organikajn funkciojn, memvolajn kaj nevolajn. La simpatiaj kaj parasimpatiaj sistemoj, la limbica sistemo, precipe, estas ligataj al la triunua forto komandata de la spirita menso, per la mediumeca fakultato. Tiamaniere, la animo regas la vivon en la fizika korpo, same kiel ĉiujn perispiritajn eblecojn. Ni povas, sendube, diri, ke la mediumeca fakultato subtenas la vivon.

Simile, "kreema talento de la animo, komunika kaj interpretkapablo de la Spirito, faktoro eneca de la propra estaĵo", rilatas, respektive, al intelektaj kreaĵoj, generante rezultojn en la plej diversaj kampoj de la homa genieco; komunikado kaj interpretado, kiel la ebleco de mediumaj fenomenoj, ekde la telepatio, rezultanta el la psika interpenetro inter du homoj, kiuj komunikas per la universala lingvo, la penso, al la kvazaŭ fantomoaj materiiĝoj de Spiritoj; kaj fine, la magneta aŭro, kiu eksterigas niajn pensojn. Ĝi estas la platformo por interkomunikado inter enkarniĝintaj kaj ne enkarniĝintaj homoj. Reala regiono de ampleksa magnetismo, kiun Kardec nomis la perispirita etoso de la enkarniĝintaj.

Ni povas, do percepti ke la mediumeca fakultato havas ampleksajn funkciojn. Tial ni estas, nature, mediumaj estaĵoj. La animo, per la menso, regas la korpon, en konstanta mediuma ago. Povas esti, por ĉio ĉi, ke Chico Xavier, demandite ĉu mediumeco estas fenestro al la ĉielo, respondis ke mediumeco estas, por li, "fenestro al la vivo". Tial ni diras, ke ni estas mediumoj dudek kvar horojn tage.

**Kiuj estas la plej grandaj defioj kiujn vi alfrontas en la kunordigado de la Mediumeca-Areo?**

La plej granda defio, sendube, estas konsciigi la mediumon pri la studbezono. Estas ankoraŭ multe da opozicio, per la ekspliko laŭ kiu praktikado sufiĉas, ke ĝi estas jam disvolvita aŭ ke studi estas enuiga. Tamen, la studo donas kvaliton al la produkto de la fenomeno, tio estas, al la mediumeca mesaĝo. Kardec observas ke ĝenerala scio pri mediumeco, same kiel specifa scio, permesas al la mediumo pli bone interpreti la pensojn de la spirita komunikanto. La kontribuon de la mediumo al la ricevo de la mediuma mesaĝo, tio estas, la vesto de la penso kun vortprovizoj rilataj al la peranto, Kardec nomis "la influo de la mediumo sur komunikado". Poste, rusa esploristo, Alexandre Aksakof, nomis la saman fenomenon animismo. Simple dirite, la penso venas de la spirito, la vortoj venas de la mediumo. Ĉi tio tiel estas ĉar la komunikado estas farita mense per bildoj, emocioj kaj sentoj, kiuj devas esti deĉifrataj de la ricevanto. Ne estas vorttransdono. Tiam la mediumo telepatie kaptas la penson kaj transdonas ĝin laŭ sia interpreta kapablo. Tiel, scio vastigas la mediuman ricevkapablon. Tial estas tiel grave studi.

**Kiu estas la mesaĝo, kiun vi ŝatus transdoni al homoj, kiuj interesiĝas lerni pli pri mediumeco kaj Spiritismo?**

Studi kaj apliki scion en la ĉiutaga vivo. Kompreni ke la studado de Spiritismo kaj mediumeco, konkrete, celas la spiritecigon de la estaĵo. Forigu la komunan ideon ke la studado de mediumeco ĝin disvolvas; tio ne okazas; aliaj faktoroj estas necesaj por disvolvi mediumecon, kiujn la studo ne tuŝas, kiel reenkarna-dispozicio aŭ regula ĉeesto al mediumaj kunsidoj. Same, necesas kompreni ke la studado de la mediumeco estas doktrina temo, kiel aliaj temoj de Spiritismo, kiujn do ĉiuj devas koni. La studado de la mediumeco estas la pordo, kiu malfermas al la kompreno de la esenco de la Societo de la Spiritoj, multe pli vasta kaj kompleksa ol la socio de la enkarniĝintoj. Ambaŭ societoj interkomunikas. Kompreni ĉi tiun dinamikon, kiu realiĝas ĉiutage, estas fundamenta por ekvilibro, evitante mensan distonion kaŭzitan de ĉikano de senkorpaj homoj, kiuj ofte ne konscias pri spirita realo kiel la plimulto de tiuj enkarniĝintaj sur la Tero. Jes, serĉu la studon de mediumeco, kiu helpas nin vivi kaj kompreni la faktojn de la vivo.

**Se vi rajtus elvoki Spiriton, kiel en la tempo de Kardec, kiun vi elvokus? Kaj kiun demandon vi farus al li?**

Interesa demando. Ni ne estas el tiuj, kiuj kondamnas aŭ kuraĝigas la elvokojn de specifaj personecoj, kvankam ni estas devigataj konsideri la preĝon kiel elvokon, ĉi-kaze, celantan altigi pensojn, en la serĉado de harmonio kun superaj spiritoj, kun Jesuo kaj kun Dio, nia Patro. Ideale, antaŭ ol ni serĉu per elvoko tian aŭ alian spiriton, intencante, ke ĝi venu al ni, malsuprenirante al nia nivelo, pli juste estus por ni klopodi altigi nin al tiuj, kiujn ni deziras elvoki. Tiam ni ne havus iun specifan enton, kiun ni kuraĝus ĝeni per niaj demandoj, ĉar en la spiritismaj verkoj ni havas ĉiujn respondojn al niaj koroj.



CEI CONSELHO ESPÍRITA INTERNACIONA

**Social Media**

Facebook

Instagram

Youtube

Online

https://cei-spiritistcouncil.com

revuespirite@cei-spiritistcouncil.com